

Bulgaria **ESPERANTISTO**





Dimitro Denčev (la dua maldekstre) kaj la politika komisaro Kiril Radev (la dua dekstre) kun sovetaj flugistoj (la foto aperas unuafoje en la gazetaro). Vd. paĝon 6!

Redakta Komitato:

Kunĉo VĀLEV (ĉefredaktoro), Vasil BORO-VANSKI, Evgeni GEORGIEV, Dimitro DENĜEV, Dimitro HAĜIEV, Maria JAN-KOVA, Krâstju KARUCIN, Haim LEVI Flori NIKOLOV.

Sekretario-administranto: **Metodi Garev**

Korektis: **K. Vălev.**

Sofio, p. k. 66

Tel. 31-00-29

Neforgebla spontana mitingo de la libero sur placo „Aleksandro Nevski“ en Sofio la 9an de septembro 1944.



ENHAVO

* * Historia turnopunkto	1
Usin Kerim. Al la partio. Tradukis K. Vălev	3
Nikola Aleksiev. Nia mirinda Anĝelo (Angel P. Ivanov)	3
Geto N. Dobrev. Ĉiam inspira ekzemplo (pri Stojan Edrev)	5
Dimitro Denčev. Helpanto de la ribelo	6
* * Strukturo de la nacia produkto en Bulgario	8
Kalinka Vasileva. Honore al Emil Ŝekerĝijski	9
Boris Kavalĝiev. E-novaĵoj el Ruse . .	9
Lasto Nikov. Vizitu denove montodomon „Esperanto“!	9
Cvjatko Todorov. Novaj esperantistoj en Ŝumen	9
Emil Ĉirpanski. Juna aktivulo de „Fajrero“	10
Talis Bercis. E-novaĵoj el Latvio . . .	10
* * La rezulto de nia konkurso: traduko de versaĵo de Pavel Matev . . .	11
Detlev Blanke. La scienca agado kaj la E-movado	11
V. Ĥromov. La streketo kaj ĝia uzo en Esperanto	14
Simeon Hesapčiev. La bildoj de la instruado de Esperanto	14
Krâstina Aleksova. La dometo de la muso	15
Ivan Haĝimarčev. Danĝera tasko . . .	16
Stojan Kostadinov. Pensoj de eminentaj bulgaroj naskitaj en septembro	III
* * El alvoko „Monda ŝaksimultano por infanoj“	III
* * Anoncoj pri la abonkampanjo de „BE“ por 1980 j. kaj pri la korespondaj E-kursoj	IV

Sur la kovrilpaĝo:

Ĉie en la patrolando la jubilanta bulgara popolo entuziasme renkontis la Sovetan Armeon-Liberiganton dum la tagoj de septembro 1944.



HISTORIA TURNOPUNKTO

La plej nova epoko en la 13-jarcenta historio de Bulgario komenciĝis je la 9a de septembro 1944 — la tago de la popola revolucio, la tago de la popola venko. Nur 35 jaroj pasis de tiu ĉi hela kaj glora tago. Sed ili egalas al jarcentoj. La revolucio vekis kaj inspiris la energion de la tuta popolo, donis al la popolo flugilojn kaj forton ekmarŝi al la plej altaj suproj de la homa progreso.

Jam en la tempo de la Komunista Manifesto kaj ankaŭ nun la malamikoj de la socialismo konkuras inter si por pentri la revolucion kiel detruadon. Por ili la revolucio estas plej timiga vorto. Sed la reala socialismo — jam de sia naskiĝo en Oktobro 1917 kaj nun, 60 jarojn poste, en multaj punktoj de nia planedo — montras, ke la socialisma revolucio estas printempo por la popoloj. Sur la standardo de nia Naŭseptembra Revolucio estas skribite: paco kaj libereco, laboro kaj kreado, egaleco kaj frateco, feliĉo kaj bonstato por la tuta popolo, por ĉiu aparta homo.

La 35 jaroj ekde la venko je la Naŭa de Septembro estis jaroj de ĉiufanka progreso de nia ekonomio, scienco, kulturo kaj arto. La heredaĵo el la kapitalisma ekonomio estis mizera: malriĉeco kaj jarcenta postresto, nedisvolvita industrio, malmoderna etbiena agrikultura mastrumo. Hodiaŭ Bulgario havas potencon energetikon kun 108-foje pli granda produktaĵo kompare kun 1939 jaro, kemian industrion kun 462-foje pli granda kaj maŝinkonstruadon kun 1129-foje pli granda produktaĵo! Supreniranta Bulgario posedas potencon konstrubazon kaj transporton kaj modernan kooperativan agrikulturon. Hodiaŭ ĝian nomon oni legas sur maŝinoj kaj alia produktaĵo, kiuj atingas pli ol 100 landojn de la planedo. Nia lando estas en la unuaj vicoj de la ŝtatoj, kiuj konstruis propran atomcentralon. Plenrajte ni nomas nian patrolandon industria, ĉar la proporcio inter la produktaĵo de la industrio kaj de la agrikulturo estas 84:16. Nun la tuta industrio donas 67-foje pli grandan produktaĵon kompare kun 1939 jaro. La statistiko montras, ke nun ĝi nur dum 4 tagoj produktas tiom, kiom dum la tuta 1939 j! En ĉiu angulo de nia patrolando la popolo konstruis uzinojn, fabrikojn, elektrocentralojn ka., en kiuj laboraskaj kreas ne nur altkonsciaj, sed ankaŭ alte instruitaj homoj — la plej granda riĉaĵo de nia lando. La Naŭseptembra Revolucio venkis en la nomo de la homo, kaj ĉio, kio estas kreita dum la pasintaj 35 jaroj, estas penetrita de granda zorgo kaj amo al la homo. La homo-kreanto, la homo-konstruanto — tiu estas la vera mastro de nia lando nun!

Kun rapidaj paŝoj evoluis la klerigo, la sciencetecnika progreso, la arto, la sanprotekto ktp. En sia 35-jara aĝo socialisma Bulgario fariĝis la sesa en la mondo ŝtato, kiu sendis kosmonaŭton en cirkaŭtera orbito. Sed la sciencetecnika revolucio postulas novajn kadrojn. Hodiaŭ en la sciencesploraj institutoj

de Bulgario laboras pli ol 62 000 sciencistoj kaj specialistoj. Laŭ nombro de la studentoj nia lando okupas unu el la unuaj lokoj en la tuta mondo. La laboruloj ĉe ni ĝuas senpagan instruadon en ĉiuj lernejoj kaj superaj institutoj, senpagan kaj altkvalifikitan medicinan helpon ktp.

Ĉion ĉi ni ŝuldas al la socialisma revolucio. Sed ĝi estus neebila sen la decida helpo de la granda Sovetunio. Ĝia nevenkebla armeo fariĝis nia duobla liberiganto — unuafoje el la otomana, duafoje el la fâŝista jugoj. Sed Sovetunio ankaŭ nun daŭre helpas nin en la paca konstruado de nova vivo. Tial por la bulgara popolo la amikeco kun Sovetunio estas tiel vivnecesa, kiel la suno kaj la aero por ĉiu viva estaĵo. Kiel frato kun frato, kiel plej fidelaj amikoj kaj kamaradoj ni marŝas por ĉiam kune al la plej alta celo — la komunisma socio. En la konscio de la nunaj kaj estontaj generacioj la Naŭa de Septembro estas kaj ĉiam restos simbolo kaj triumfo de la sankta amikeco inter n.aj du frataj popoloj.

Bulgario celebras la tagon de la libereco en firma amikeco ankaŭ kun la popoloj de la socialisma komunismo, kiuj alte tenas la standardon de paco kaj libereco. Ni gloras la Naŭan de Septembro ankaŭ kiel feston de nia solidareco kun la monda komunista kaj laborista movadoj, kun la naciliberigaj movadoj de la subpremitaj popoloj. Nia vivo kaj batalo estas en la unuaj vicoj de la tutmonda revolucia proceso, kie bolas la grandioza batalo por paco kaj demokratio, por libereco kaj nacia sendependeco, por socialismo.

La pasintaj 35 jaroj estas la plej alta pinto, kiun atingis nia popolo en sia 13-jarcenta historio. De ĉi tiu alta pinto ni rigardas kuraĝe antaŭen. Venas novaj grandaj venkoj. Socialisma Bulgario neflankiĝante marŝas antaŭen kaj supren.

La bulgaraj esperantistoj donis en la batalo por libero karajn viktimojn. Per oraj literoj en la historio de la bulgara E-movado brilas la nomoj de tutlande konataj kaj amataj naciaj herooj-esperantistoj kiel Nikola Botuŝev, Nikola Ŝopov, Stojan Edrev, Ĥristo Kârpaĉev, Diĉo Petrov, Cvetan Spasov, Vârban Genĉev, Vela Peeva kaj pli ol cent aliaj fidelaj gefiloj de nia popolo, kiuj oferis la plej karan — sian vivon — sur la altaro de la libereco.

Dum la jaroj de la libera vivo la bulgaraj esperantistoj kum amo kaj alta konscio donas sian laboron, fortojn kaj energion por la konstruado de matura socialisma socio en la patrolando. Ili estas sinceraj batalantoj por nova mondo, en kiu la rajtoj de ĉiu homo estos vere estimataj kaj protektataj, mondo, en kiu triumfos paco, libereco kaj internacia amikeco. Per Esperanto ili praktike kaj ĉiutage laboras por tiu ĉi plej grava kaj plej altnobla celo.

Kun la arda entuziasmo de niaj karaj kamaradoj-esperantistoj, pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo — al inspirita kaj sindona laboro, por renkonti per novaj, grandaj sukcesoj la 40an jubilean kongreson de BEA en 1980!

Vivu la Naŭa de Septembro — turnopunkto en la historio de nia patrolando!

LETERVESPERON aranĝas E-grupo de Békéscsaba la 6an de decembro 1979. Ni varme apelacias: bonvolu sendi salutkartojn, korespondproponojn kaj materialojn por ekspozicio. En la grupo deziras korespondi tutmonde gejunuloj (20—30-jaraj) kaj ankaŭ plenaĝuloj. Respondo certa!

Nia adreso: Esperanto-grupo, Békéscsaba, poŝtkesto 191. H-5601, HUNGARIO.



AL LA PARTIO*

Kiam parolas vi, penetras vi la korojn,
malfermas sin okuloj, ekstremas tuta mond'!
Kaj marŝas kune ni sub flago de la gloro,
sciante: vivis ne, sed vivas Dimitrov!

Vi — nia konscienco! Amata vi patrino!
Apogo firma en laboro kaj batal'!
Simile arbotrunko, kreskinta el radiko,
el via sorfo kreskis la sorto de l'popol'!

La ĝojo nia samas, la pensoj, revoj samas,
kun vi tra ŝtormo marŝas al hela tago ni.
Pli belan vivon mi en mondo ĉi ne konas
ol tiun — vivi tiel, kiel instruas vi!

Ekdormas la infan', en song' rideto lumas.
Kaj la patrin' feliĉa, trankvila kaj sen tim'
al vi kliniĝas ame, ĉar sub ĉielo pura
ne korvoj nigraj grakas, kolomboj kveras nuu!

El la bulgara: Kunĉo Vâlev

* La Bulgara Komunista Partio.



Nikola Aleksiev

NIA MIRINDA ANĜELO (ANGEL P. IVANOV)

Hodiaŭ li povus esti unu el la veteo-
ranoj de la bulgara E-movado. H-
ve, li pereis apenaŭ 32-jara... Ni,
liaj kamaradoj, konservas en nia me-
moro la bildon de tiu ridetanta juna
viro kaj tute ne povas imagi lin kiel
grizharan veteranon.

Naskita la 17an de aŭgusto 1909 en
la apuddanuba urbo Orjahovo, Angel
frue orfiĝis. En la fino de la Unua
Mondmilito lia patro, laboristo-social-
demokrato, pereis sur la fronto. La
mizera vidvina pensio de lia patrino
ne sufiĉis eĉ por garantii la panon de
la familio. Angel devis labori kiel hel-
panto en librovendejo kaj samtempe
lerni. Poste, jam plikreskinta, li ko-
mencis perlabori la panon per pen-
trado de magazentabeloj (ŝildoj). Eni-
rinte la junularan revolucion movadon
jam kiel gimnaziano, li poste estis
elektita sekretario de la organizaĵo
en sia naskiĝurbo kaj en la subdi-
strikto.



En 1931 laŭtune Anĝelo venis al
Sofio por studi en la pedagogia fakultato

de la universitato, samtempe laborante kiel ŝildodesegnisto. Estante fervora e-isto jam en la lastaj jaroj de la gimnazio, korespondanta kun e-istoj el Svedio, Aŭstralio kaj aliaj landoj, li aliĝis al la laborista E-movado. Veninte Sofion, li estiĝis kunlaboranto de CK de la Bulgara Laborista E-Asocio (BuLFA) kaj respondeca redaktoro de ties eldonaĵo „Internacia Laborist-Kampana Korespondarto“ (ILKK). Iom poste li estis elektita membro de CK de BuLEA. La faŝista cenzuro konfiskis numerojn de ILKK kaj sendis la respondecan redaktoron Anĝelo en malliberejon, de kie li estis liberigita post kelkaj monatoj. Li daŭre studis pedagogion kaj samtempe estiĝis kunlaboranto de CK de la Sendependaj Revoluciaj Sindikatoj (NRPS). Tie li laboris kiel administranto de la eldonaĵoj de NRPS kaj en 1932 kaj 1933 fariĝis respondeca redaktoro de ties centra organo, la gazeto „Edinstvo“ (Unueco).

Sed la 19an de majo 1934 en nia lando okazis militista faŝista puĉo, kaj ne post longe estis malpermesitaj ĉiuj progresemaj organizaĵoj kaj ties presorganoj. En la fino de 1934 Anĝelo estis kondamnita je dujara mallibereco. Li tamen eskapis el la ungoj de la polico, fariĝis eksterleĝulo kaj plue laboris kiel funkciulo de la jam eksterleĝaj revoluciaj sindikatoj NRPS, gvidante ties stencilitajn eldonaĵojn. Anĝelo helpadis la laboron de plej elstaraj funkciuloj de la Komunista Partio, organizis por ili kaŝejojn. Li eldonis E-informbultenon por la eksterlanda revolucia gazetaro, havigante al ĝi tiamaniere informojn pri la situacio kaj la bataloj de la laboruloj sub la fera kalkanumo de la faŝista diktaturo en nia lando. Anĝelo kunlaboris ankaŭ en la redaktado de la speciala E-paĝo de la ĉiutaga ĵurnalo „Zarja“. Malgraŭ la minacoj de la faŝista polico li gvidis E-kursojn por laboruloj en la proletaj kvartaloj de Sofio kaj en kelkaj popolaj legejoj (publikaj bibliotekoj).

Post la naskiĝo de la tronheredanto en 1937, estis proklamita ia kripligita amnestio, kaj Anĝelo sukcesis denove legaliĝi. Li daŭrigis la studadon laborante kiel konstrulaboristo. En la sama tempo li plenumis respondecajn partiajn funkciojn ĉe la membro de Politburoo de la Komunista Partio Vlado Georgiev kiel politika helpanto pri la gazetaro. En marto 1941 Vlado Georgiev, Anĝelo kaj aliaj kamaradoj estis arestitaj. Sekvis teruraj policaj inkvizicioj. Post dektaga turmentado Anĝelo estis sendita al malsanulejo, sed nur post semajno oni denove venigis lin en la Direkcion de la Polico kaj la inkvizicioj daŭris. Fine de marto, vidinte, ke liaj fortoj preskaŭ elĉerpiĝis, la polico sendis lin al malliberejo, por ke li mortu tie. Kun ruinigita korpo, sed kun firma revolucia spirito Anĝelo pasigis la reston de sia vivo en la malsanulejo de la prizono. La 13an de junio 1941 li forpasis kaj poreterne fermis siajn belegajn okulojn. Tiel sinofere finis sian mallongan, sed enhavoriĉan vivovoĵon la granda humanisto, patrioto-internaciisto, ĝismorte fidela revoluciulo-komunisto, elstara funkciulo de la laborista E-movado en Bulgario Angel Petkov Ivanov (Anĝelo).

El la profundo de la pasintaj jardekoj lia ekzemplo de batalanto por libereco, paco kaj interkompreniĝo de la popoloj brilas kaj edukas nin, la vivantojn, ĉerpi el lia firma kredo kaj sekvi lian vivovoĵon en la novaj kondiĉoj de konstruado de matura socialisma socio. En lia naskiĝurbo granda industria entrepreno fiere portas lian nomon, kaj antaŭ la ĉefpordo staras bela marmora monumento de la neforgesebla heroo.

La malamiko forŝiris lin el la vicoj de la nobla E-movado, sed li ne kapablis elŝiri lin el la koroj de la dankaj novaj generacioj kaj de liaj malnovaj amikoj kaj kamaradoj. Ni ĉiuj lernas el lia ekzemplodona agado, kiamaniere ami sian socialisman patrolandon kaj servi al ĝi fidele kaj ĝismorte.



ĈIAM INSPIRA EKZEMPLO

Frue Stojan Edrev Dojnov eniris la vicojn de la revolucia movado en sia naskiĝvilaĝo Radjuvene (nun portanta lian nomon — Stojanovo), di-



strikto de Loveĉ. Jam gimnaziano li fervore kaj abnegacie eklaboris en la kooperativa grupo kaj en la popola legejo, profunde studis verkojn de marksismo-leninismo. Kun ardo li komencis studi ankaŭ la lingvon de la internacia amikeco E-o.

Antaŭ li en Radjuvene estis e-istoj: Geto Dobrev, Nikola Gajdov, Kolju Majnov, Vâlko Petrov, Necka Getova, Velko Petkov, Petko Nenĉev, Velko Gulĉanski ka. Sed kiam Stojan Edrev fariĝis e-isto, tuj ĉiuj eksentis la ĉarmon de alloga kaj unuiga forto. Stojan donis novan impulson al la lernado de E-o. En la klubejo de la Komunista Partio estis malfermita E-kurso. Kreskis la anaro de la verda taĉmento, plimultiĝis la abonoj al „Balkana Laboristo“, „Bulgara

Esperantisto“, „Heroldo“. Plimultiĝis ankaŭ la E-literaturo, pri kiu ni disponis. Komenciĝis vigla korespondado kun progresemaĵoj eksterlandaj e-istoj el USSR, Estonio, Finnlando, Japanio, Jugoslavio ka. Pere de E-o ni konatiĝis kun la Stahanov-movado en USSR, kun la junulara vivo kaj la atingoj de la socialisma konstruado en la granda frata lando — fortikaĵo de la socialismo kaj nia inspiranto.

Animo de ĉi tiu agado estis Stojan Edrev. Li inde portis la verdan stelon kaj ne ellasis okazon alparoli nin en E-o. En la lernado de la Internacia Lingvo li montris eksterordinaran persiston, obstinon kaj paciencon. Li multe legis esperantaĵojn, korespondis. Aparte notinda estis lia maniero lerni novajn vortojn pere de persone skribitaj vortoj sur malgrandaj folietoj — sur unu flanko la E-vorto, sur la alia flanko — ĝia traduko. En la poŝo de Stojan ĉiam estis tiaj folietoj. Amuzaj estis liaj ŝercoj, kiam li ligis la E-vortojn kun la ĉirkaŭa medio, kun diversaj okazaĵoj kaj momentoj el la vivo. Tiel la vortoj pli profunde gravuriĝis en la memoro.

Poste, kiel studento de pedagogio en Sofio, Stojan persone konatiĝis kun multaj kaj elstaraj e-istoj, kreskis plu kiel e-isto.

Mi aparte rememoras pri la „ĵurnalo parolata“ en Radjuvene. Stojan estis membro de la redakta komisiono kaj respondecis pri la fakoj „Internacia revuo“ kaj „Humuro kaj satiro“. Por tiu ĵurnalo li bonege uzis ankaŭ materialojn ricevatajn pere de E-o. Eĉ nun mi memoras anekdotojn el la ĵurnalo parolata. Ekzemple pri Te mistoklo. Li edzinigis sian filinon a malriĉa, sed bona junulo. Oni deman-

dis lin kial. Li respondis: „Ĉar mia filino pli deziras homon sen mono ol monon sen homo.“ Similaj anekdotoj, humuraĵoj, sentencoj, spritaĵoj variigis la ĵurnalon parolatan, kaj kiam oni sciigadis, ke estos tia ĵurnalo, la granda kooperativa salono plenumiĝis. En ĝi krom tradukaĵoj Stojan Edrev legis ankaŭ kelkajn siajn raportaĵojn ligitajn kun la E-vivo kaj laboro.

Dum la jaroj de la tutpopola rezisto kontraŭ la faŝismo Stojan Edrev plene fordonis sin al la batalo. Fidela filo de la laborpopolo, kuraĝa,

nobla kaj kun alta sento pri socia justeco, li fariĝis popola partizano, iom poste — estro de la XI operacia partizana zono de Pleven. La 19an de junio 1944, malpli ol tri monatoj antaŭ la glora venko de la popolo, li heroe falis en la kruela batalo kontraŭ la monarkofaŝista tiranio. Sed lia nomo restis por ĉiam. Lia ekzemplo ĉiam inspiras nin en la laboro por la bono kaj feliĉo de la popolo, en la granda batalo por amikeco kaj kompreniĝo inter la popoloj, por paco en la mondo.

Dimitro Denĉev
flugisto-piloto

HELPANTO DE LA RIBELO

Por iuj la 9 de septembro 1944 estas nur dato*. Por aliaj festo. Por la revoluciuloj ĝi estas venko, ne nur parto de ilia vivo, sed komenco de nova vivo, por kiu oni pagis per sango, per la vivo mem; tago, kiam rompiĝas la tempo.

La homoj, kiuj faras revolucion, ne estas kulpaj, ĉar la revolucio mem efektiviĝas per ili. Tiuj homoj nur servas al la volo de la historio. Per la revolucio venas nova vivo ne nur por apartaj homoj, sed por tutaj popoloj. Ĝis hieraŭ estis caro, morgaŭ lia moŝto jam ne ekzistas. Ĝis hieraŭ estis sinjoroj, tiranoj, murdistoj, kaj jen per la ribelo venas nova socia ordo. Iuj homoj estas nepreparitaj por renkonti tiun tagon. Aliaj longan tempon batalis por ĝi. Kaj nun ĉiuj devas kune ekiri laŭ tiu nova vojo de la historio.

La historiaj eventoj restas neforgeseblaj. Kaj ĉiujare mi denove travivas en miaj pensoj la ardajn tagojn, kiam mi rapide, iufoje por minutoj, renkontiĝis kun multaj homoj sur

la vojo de la revolucio, plenumante kun ili la taskojn de la tempo. Kaj poste vane mi streĉas la memoron: kiuj estis la du viroj, kiuj donis al mi ĉe la flughaveno „Graf Ignatievo“ la agitmaterialojn pri la nova potenco? Mi flugis super Suda Bulgario por disĵeti ilin en urbojn kaj vilaĝojn. Ambaŭ viroj, reprezentantoj de la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto, venis tiam, antaŭ 35 jaroj, per aŭtomobilo el Plovdiv. Mi apenaŭ rememoras la meze altan figuron de unu el ili. . .

La historio marŝis venkante. Ni estis ĝiaj helpantoj.

Post la eniro de la Ruĝa Armeo en nian landon la rezisto de la faŝista reakcio estis paralizita. Sed iuj adeptoj de la cara reĝimo, restante ie sur siaj postenoj, kontraŭstaris. Ekzemple en Plovdiv je la 9 de septembro el la balkano de la polica inspektorejo oni pafis al la manifestacio, gvidata de la ĵus liberigitaj politikaj malliberuloj. La regimento en u. Ĥaskovo tenis en siaj manoj la kazernon ĝis la 13a de septembro.

La 9an de septembro matene mi revenis en la flughavenon „Graf Igna-

* Je la 9 de septembro 1944 per popola ribelo estis renversita la faŝista potenco en Bulgario. Nun tiu dato estas la nacia festo de Popola Respubliko Bulgario.



tievo“, kie mi estis oficiro en Dua Aersturma Regimento. La tri flugrotoj de la regimento estis sur kampaj tendaraerodromoj. La oficiroj en la militaj flughavenoj subskribis unu al alia oficordonojn por translokiĝi en alian regimenton.

Ni ne povis atendi inviton kaj ordonon. Ni devis ekflugi por montri, ke la aerarmeo ankaŭ subtenas la ribelon.

Sed mankis sendifekta maŝino. La hangaroj estis ŝlositaj. Tamen la soldata komitato, ĵus formita, jam agis. Ĝi malfermis la hangaron. La teknikisto Dejan Antov entuziasme kaj tre fervore preparis por flugo maŝinon „Alaŭdo — 43“. Rapide oni trovis benzinon kaj lubrikaĵon. Estis trovita ankaŭ ruĝa tolo, el kiu ni preparis du flagojn po ses metroj longaj. Sur la flagoj ni desegnis serpon kaj martelon kaj fiksis ilin ambaŭflanke de la aviadilo. Multe helpis la fotografisto Boris Dimitrov. Samtempe ni kunprenis amason da ruĝaj signalaj paraŝutraketoj. Kaj mi ekflugis!

Ni devis kunagi, altigi la ribelan animstaton de la soldatoj en la kazernoj, por ke ili ekregu la situacion per siaj komitatoj. Ni devis montri al la popolo, ke la libero triumfas ĉie en la lando! Ĉe ĉiu fervojstacio aŭ vojo ni provokas erupcion de revolucia entuziasmo. Aperante super iu vilaĝo aŭ urbo, niamaŝino faras kelkajn flugorondojn. Post ĝi en la aero ekbrilas ruĝaj raketoj. Sube la homoj kuras tra la stratoj al la centra placo, svingas per manoj kaj flagoj, salutas nin. Komenciĝas spontana mitingo. Survoje veturas kamiono, plena je homoj, kiuj ankaŭ mansvingas, salutas krie. Veturas vagonaro. Mi proksimigas la maŝinon kaj flugas preter la vagonoj mem. Ĉiuj vojaĝantoj amasiĝas ĉe la fenestroj, svingas per manoj, per tukoj, kriegas, entuziasme salutas nin, salutas la revolucion!

Nia aeroplano aperis super Plovdiv, Pazarĝik, Asenovgrad, Pârvo-maj — super multaj loĝlokoj en Suda Bulgario. Mi kaj mia navigisto-observanto Veselin Kostov rigardis la helan vizaĝon de la patrolando, la revolucion entuziasmon de la popolo, tiun neviditan ĝis nun politikan boladon, tiun potencon ekmovon de la tuta popolo, la jubilon de la homoj ĉe la unuaj radioj de la libero.

Kvar tagojn super la libera lando! La kvinan tagon, — la 13an de septembro, eksonis la telefono: „Halo! Telefonas la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en Plovdiv. Vi estas tro necesaj al ni. Vi devas ekflugi al Hâskovo, super la kazernon. Jam kvin tagojn la caraj oficiroj tie tenas la regimenton. . .“

La vetero ne estis bona. Nebulo rampis sur la kampo. Ĉirkaŭ 14 horo la vento iomete dispelis la nebulon kaj mi decidis ekflugi. Krom ruĝaj raketoj la navigisto enmetis en la malantaŭan kajuton malgrandajn bombojn. La kamaradoj el Plovdiv sciigis al Haskovo, ke venos aeroplano en batala preteco. Kaj ankoraŭ ne alfluginte la kazernon, ni vidis super la tegmento de la regimento blankajn flagojn. La popolo jam estis eniranta la kazernon. Falis unu fortikigita punkto de la faŝismo, eble la lasta, kiu povus kaŭzi sangoverŝon.

Rondfluginte kelkfoje super la urbo, ni elpafis raketojn, kiuj malrapide, triumfe falis sub siaj ruĝaj delikataj paraŝutetoj. Poste ni ekflugis al Harmanli. Sed la aeroplano ekfumis, la temperaturo de la lubrikaĵo plialtiĝis. Post longa serĉado de loko por surteriĝo, ĉe malfavoraj kondiĉoj mi decidis fari tion sur la herbejon apud la tiama fervojstacio „Rakovski“, nun parto de u. Dimitrovgrad. La neseziozaj kontuzoj ne malhelpis nin ekstari sur la piedoj. Ĉirkaŭ ni tuj kolektiĝis homoj.

Ankaŭ nun mi vidas sur la ŝoseo kurantan veturilon, tiratan de ĉevalo, la homojn venintajn al ni por

doni la unuan urĝan helpon. Ankaŭ nun mi aŭdas la vortojn: „Estas rusoj!“, „Ne, bulgarioj!“ Ankaŭ nun mi vidas la maljunulinon kun nigra tuko sur la kapo, kiu rapidis al mi kun etenditaj brakoj. Pensante, ke mi estas rusa flugisto, ŝi ĉirkaŭbrakis min. En ŝiaj okuloj estis larmoj de ĝojo, de profunda kor-emocio.

Ni devis zorgi pri la serioze difektitaj maŝinoj. Estis tre malĝoje rigardi la grandan metalan birdon kuŝanta kun la radoj supren, silentanta, senpova, senmova. Post tiom da flugoj dum la memorindaj kvin tagoj ĝi staris sur la herbejo senviva. Ambaŭflanke pendis la du ruĝaj flagoj, disfadenigitaj, balancataj de la venteto.

„Alaŭdo — 43“ estis doninta sian helpon al la ribelo.

Gazeto „Oteĉestven Glas“ [(Patrolanda Voĉo) en Plovdiv tiam skribis: „La unuaj sovetaĵaj aeroplanoj ĝisflugis Bulgarion kaj Plovdiv!“ Tiuj „sovetaĵaj“ aeroplanoj estis fakte nia „Alaŭdo — 43“. La sovetaĵaj avidiloj alflugis iom poste.

Pasis jaroj. Kiam nia libero havis sian 25-jaran aĝon, dum konversacio tute hazarde mi eksciis, ke unu el la du kamaradoj, kiuj venadis el Plovdiv al mi en aerodromon „Graf Ignatievo“ por alporti la agitmaterialojn, estis nia nuna prezidanto de Bulgara E-Asocio — Ĥristo Gorov. Do, la ribelo kaj la tempo ne nur disigas la homojn, sed ankaŭ kunigas ilin.

STRUKTURO DE LA SOCIA PRODUKTO EN BULGARIO

Dum la jaroj de socialisma konstruado en Popola Respubliko Bulgario la kolektiva socia produkto kreskis 17-foje. Samtempe ekestis progresemaj kvalitaj ŝanĝoj en ĝia strukturo. Ekzemple en la antaŭmilita 1939 jaro la industrio donis nur 19% de la socia produkto, sed en 1977 j. ĝia parto estis jam 66%. Dum la sama periodo la parto de la agrikulturo kaj forsto malgrandiĝis de 59% al 12%. Progresemaj strukturŝanĝoj ekestis ankaŭ en la aliaj branĉoj de la nacia ekonomio.

La ŝanĝoj en la dinamiko kaj strukturo de la kolektiva socia produkto estas ankoraŭ unu elokventa kaj nerefutebla pruvo pri la giganta paŝo antaŭen, kiun faris nia socialisma patrolando dum 35 jaroj de libera vivo.

	1939 j.	1956 j.	1978 j.
PRODUKTADO DE ELEKTROENERGIO (en milionoj da kilovathoroj)	266	2393	31 490
AKIRO DE ŜTONKARBOJ (en miloj da tunoj)	2214	10 817	27 090
PRODUKTADO DE ŜTALO (en miloj da tunoj)	6	130	2470
PRODUKTADO DE CEMENTO (en miloj da tunoj)	225	859	5100

IETERVESPERON aranĝos la E-grupo en Lajpcig okaze de la 30a datreveno de la fondiĝo de GDR en oktobro 1979. Bonvolu sendi leterojn al adreso: Kulturbund des DDR-Leipziger Arbeitskreis Esperanto, Kathe-Kol. DDR — 7010 Leipzig.

Ni respondos al ĉiuj!



[HONORE AL EMIL ŠEKERĜIJSKI

La 1an de aŭgusto la sofiaj e-istoj dediĉis sian kunvenon al la memoro pri la fama antifaŝisto kaj e-isto Emil Šekerĝijski — politika komisaro de la partizana taĉmento de Kjustendil, lige kun la 35-jariĝo de lia heroo pere.

Pri la vivo kaj riĉa kontraŭfaŝisma batalo de Šekerĝijski parolis lia kunbatalanto Mojs Benvenisti (vd. detale en n-ro 7—8).

Rememorojn pri Šekerĝijski kiel e-isto, sociaganto kaj homo rakontis Kosta Georgiev — lia iama kunlernanto el la klaso de Ljuben Ĉomakov, kaj d-ro Stojan Moresku — lia tiama E-korespondanto.

La publiko aŭdis multon tute nekonatan kaj ege interesan pri la brava revoluciulo, talenta ĵurnalisto kaj propagandinto de marksismo-leninismo inter la ordinaraj laborhomoj Šekerĝijski, kiu fordonis sian altvaloran vivon kaj talenton al la Bulgara Komunista Partio kaj la bulgara popolo.

La 3an de aŭgusto e-istoj kune kun multaj aliaj civitanoj kliniĝis antaŭ la Frata Tombejo en la Parko de Libereco, prezentante florojn.

Kalinka Vasileva

E-NOVAĴOJ EL RUSE

En junio 10-persona grupo de e-istoj sub la gvido de k-dino Sofia Sutrova laboris en la esperantista aleo de la apuddanuba parko de Ruse. En la aleo oni „skribis“ per floroj la nomon de nia lingvo kaj ĝia kreinto. Ankaŭ la verda stelo emblemas tie. Inĝ. Donĉeva, estro de fako „Parkoj kaj ĝardenoj“, enmanigis dankdokumenton al la fervoraj brigadanoj.

*

Lasttage de julio malgranda grupeto el membroj de E-societo „Libero“ ekskursis al la proksima vilaĝo Ĉervena Voda. Renkontis nin kun floroj lokaj e-istoj.

Unue ni vizitis la muzeon de la konata bulgara patrioto, batalanto kontraŭ la osmana jugo, Toma Kârĝiev. En la muzeo ni rigardis multajn bildojn kaj dokumentojn pri la vivo kaj batalo de la heroo, ankaŭ pri la taĉmento de Ĉervena Voda kontraŭ la tiranoj. Nun la loka legejo (biblioteko) havas la nomon de la granda patrioto T. Kârĝiev.

Poste ni estis en la domo de s-anino Deĉka Paŝeva, kiu bonege nin gastigis.

Boris Kavalĝiev

VISITU DENOVE MONTODOMON „ESPERANTO“!

Agrabla somera vespero. Ni sidas apud montodomo „Esperanto“ sur Vitoŝa kaj ĝuas la noktan panoramon. Malsupre, en la kamparo, Sofio ripoze spiras, mire bela.

Montodomo „Esperanto“ estas bone konata al la sofiaj e-istoj. Ĝin konas ankaŭ la neesperantista publiko. Vizitas ĝin plezure e-istoj el la provinco, eksterlandaj geamikoj.

Agrable fluas la vortoj de Albert Liĝi el la turista societo „Ĉerni Vrâh“, ĉe kiu funkcias la esperantista sekcio en Sofio.

— Post la konstruo de elektra instalaĵo, — diras li, montrante al la 720 metrojn longa fosaĵo, — en la montodomo estos bone solvitaj multaj problemoj. Oni proponas ankaŭ plilarĝigon kaj modernigon de la konstruaĵo. Estus bone, se oni konstruus apude ankaŭ magazenon, restoracion ks.

Liĝi estas la teknika gvidanto de la elektrecigo. Mi atente sekvas liajn vortojn, sed mia penso revenas al tiuj 50 e-istoj kaj ankoraŭ tiom da nee-istoj — ĉiuj membroj de societo „Ĉerni Vrâh“, kiuj donis senpage sian laboron kaj dum malpli ol tri semajnoj preparis la fosaĵon por la kablo. El ili Angel Filipov el E-societo „M. Gorkij“ elfosis 75 metrojn, la 75-jara Boris Hikov laboris 7 tagojn sur la plej malbona, ŝtonoriĉa tereno, Asparuh Ŝumski plenumis je 400% sian tagan normon, fervore varbis homojn kaj mem akurate laboris Manol Jordanov ktp. Ankoraŭ unu bona nobla socia faro de e-istoj kaj turistoj! En la komuna laboro ankoraŭ pli firmiĝis ilia amikeco kaj preteco kune labori, eduki amon kaj estimon al la homoj kaj la naturo, al la popolo kaj la homaro, al la paco kaj la paca konstruado de nova vivo.

Lasto Nikov

NOVAJ ESPERANTISTOJ EN SUMEN


Dum la lernojararo 1978/79 en Sumen funkciis 4 E-kursoj por komencantoj kaj 1 por progresintoj, organizitaj de E-societoj „Vekiĝo“ kaj „Progreso“. Kursgvidantoj — Rajna Kasabova, Vasil Georgiev, inĝ. Stefan Georgiev. Dank’ al la sukcesa kursa laboro novaj fortoj aliĝis al la verda taĉmento.

En speciala kunveno pri la E-lernojararo al ĉiuj sukcesintoj ĉe la ekzamenoj oni enmanigis atestojn, E-librojn kaj verdstelajn insignojn.

Cvjatko Todorov

Juna esperantisto

JUNA AKTIVULO DE „FAJRERO“



Lia nomo estas Jakim. Mezalta, ĉiam rapidema kaj energia, kun agrable serioza esprimo de la vizaĝo, ofte kun mola rideto. Jakim Osanliev estas lernanto en la IX klaso de gimnazio „Dimitro Blagoev“ en u. Dospat, en la ĉarma Rodopi-montaro. En sia klaso li estas koro de la komsomola vivo. Ankaŭ membro de la lernejana komitato li estas.

Tute modesta junulo kaj perfekta lernanto, Jakim ĉiam pretas helpi al siaj samklasanoj.

Se temas pri E-o, oni kun plezuro konstantas, ke li jam sufiĉe bone regas la lingvoj kaj estas unu el la plej sindonaj aktivulo en Dospat. Komencinte lerni la lingvon en la sesa klaso ĉe Velurina Ĉirpanska, li nun estas en la grupo de la progresintoj. En la momento li estas prezidanto de la lernejana sekcio de E-societo „Fajrero“. Kiel membro de la gimnazia lernejana komitato Jakim respondecas pri la klubo de internacia amikeco.

Surbruste kun la verda stelo, enkorpe kulan amo al E-to kaj la noblaj ideoj de la E-movado, modesta kaj energia, ĉiam leborema kaj disciplinema, Jakim Osanliev estas modelo kaj ekzemplo de juna aktivulo de la bulgara E-movado.

Emil Ĉirpansk

Interŝanĝu spertojn!

E-NOVAĴOJ EL LATVIO

Finiĝis la dua studjaro en la E-rondeto ĉe la Pionira Palaco de Rigo. Ĉi-jare la lingvoinstruado okazis en tri kursoj: elementa por ruslingvanoj (instruis Natalia Berce), elementa kaj paroliga por latvoj (instruis Tālis Bercis). En la kursfina vespero estis prezentita interesa kaj varia artprogramo — la rondetanoj manifestis antaŭ la gvidantaro de la Pionira Palaco kaj antaŭ siaj gepatroj bonan lingvoscion, recitante poeziaĵojn de L. Jevsejeva, J. Baghy, K. Kalocsay. Estis plenumitaj ankaŭ multe da kantoj kaj eĉ teatraĵo fare de junaj e-istoj kaj membroj de la Junulara Klubo „Fenikso“.

*

Kun la celo organizite gvidi la junularan E-movadon en Rigo, la 15an de aprilo tie oficiale fondiĝis nova junulara E-klubo „Fenikso“. Ĝi funkcias ĉe la Regiona Komitato de Komsomolo en Rigo. Samtempe la E-rondeto ĉe la Pionira Palaco iĝis ĝia sekcio. La ĉefa agadtereno de la novefondita klubo estas apliki E-on en komsomolmedio, montri ĝian utilon en internacia edukado de la junularo.

Dum tri monatoj post la fondo de la klubo la feniksanoj faris bonsukcesan propagandkampanjon en la gazetaro. Sub ilia egido okazis priesperantaj prelegoj, kaj estis organizitaj 4 lingvokursoj kun pli ol 50 gekursanoj.

*

La 23—24an de junio la Riga Junulara E-klubo „Fenikso“ organizis en la pitoreska urbeto Vaidava apud Valmiera (Latvio) la tradicion Renkontiĝon de E-istoj Kantistoj (REK-II). La aranĝon partoprenis pli ol 45 novaj katemuloj de preskaŭ 20 urboj el tuta Sovetunio: Kiev, Mahaĉkalà, Mias, Ĉeljabinsk, Rostov ĉe Dono, Moskvo, Tiĥvin, Vilnius, Ufa ka. Estis prezentitaj novaj originalaj kantoj. La unuan lokon en la branĉo „originalaj kantoj“ akiris Miĥaelo Bronŝtejn el Tiĥvin (apud Leningrado), en la branĉo „tradukitaj kantoj“ la kanto-tradukoj de prof. A. Koroleviĉ el Lvovo (Ukrainio) kaj en la branĉo „plenumo de kantoj“ — ensemblo el Kiev. La partoprenantoj kun granda intereso spektis la lokajn naciajn aranĝojn de la latva popolo, aŭskultis specialajn kantojn, gustumis na-



ciajn manĝaĵojn. En ĉies memoroj ankoraŭ longe restos la ĉi-jara REK-II, donante inspiron por tradukado kaj verkado de novaj kantoj por la sekva renkontiĝo.

*

Post la fondo de Asocio de Sovetaj E-istoj (ASE) en respubliko Latvio la gazetaro komencis regule aperigi priesperantajn artikolojn fare de lokaj e-istoj. Dum iom pli ol tri monatoj la gazetaro de tutrespublika signifo aperigis priesperantajn artikolojn en suma kvanto de 1,5 milionoj da ekzempleroj. Por nia respubliko, kies loĝantaro ne superas 2,5 milionoj, tio, sendube, estas konsiderinda atingo. Menciindas, ke 95% el ĉiuj aŭtoroj de artikoloj estas membroj de la junulara klubo „Fenikso“.

*
! En la fino de junio en Rigo gastis koruso el Gabrovo (Bulgario). Inter la korusanoj estis ankaŭ la e-istino Sonja Tiĥova. Krom sia ŝatokupo — la kantado — Sonja aktivas ankaŭ kiel E-instruistino: pasintjare ŝia E-kurso en Gabrovo establis bonajn amikecristojn kun samaĝuloj el la E-rondeto ĉe la Pionira Palaco en Rigo. Nun la membroj de la junulara klubo „Fenikso“ havis eblecon persone konatiĝi kun leteramikino el Gabrovo — la Urbo de la satiro kaj humuro. La klubanoj pasigis agrablajn vesperojn kun siagastino, interŝanĝante opiniojn kaj planojn pri estonta kunlaboro. Nia adreso: SU-226050, Latvio, Riga-50, p. k. 150, k-do Talis Bercis.

T. Bercis

LA REZULTO DE NIA KONKURSO

En la rubriko „Juna Esperantisto“, n-ro 1/1979, ni anoncis konkurson pri traduko de lirika versaĵo de Pavel Matev. Responde nur 5 samideanoj sendis tradukojn. Ni trovis plej bona la tradukon de Dimitro kaj Emil Dimov el Varno (patro kaj filo) kaj ni publikigas ĝin ĉi tie. Dankon al ĉiuj pro la partopreno en la konkurso!

Pavel Matev

Se formortus la grandaj pasioj,
kaj min kovrus la tomba malvarm',
mi memore forprenos de l' vivo
lastan tremon pri la vorto am'.

Lastan tremon pri am' malkvieta
de okuloj du plenaj de ĝen' —
du titoloj de verko poeta,
belsonanta pri vi mem poem'.

Nigran Maron mi prenos — ĝi portu
min suronde kun krio de lar',
la trakiajn radsulkojn — senvorte
min konduki al vitfoliar'.

Fluon de Marica nostalgia,
tristan tremon de suda stelet',
unu ombron de pin' kaj abio,
akvon puran de monta torent'.

Unu blankan paperan folion
por la krea, senmorta soif'
kaj la lastan, senvortan „adiaŭ“
de du larmoj, verŝitaj por mi.

El bulgara: Dimitro kaj Emil Dimov

Detlev Blanke

LA SCIENCA AGADO KAJ LA E-MOVADO

De la 23a ĝis 28a de aprilo 1979 mi havis la tre agrablan taskon prelegi en Plovdiv kaj Sofio (Bulgario), inter alie pri sciencaj temoj. Tiu tasko por mi ne nur estis tre agrabla pro la bonegaj kondiĉoj de mia restado en Bulgario kaj la multaj tre valoraj renkontiĝoj kun bulgaraj e-istoj, sed ankaŭ pro la forta interesiĝo, kiun mi sentis flanke de la aŭskultantoj pri interlingvistikaj problemoj. Multaj diskutoj koncernis la rilatojn inter la scienco kaj la aktuala E-movado. Mi do provos resumi kelkajn problemojn.

1. La rolo de la scienco kreskas

En ĉiuj branĉoj de la vivo oni rimarkas daŭre kreskantan signifon de la scienco. Ne-niu grava decido en natursciencaj, sociaj aŭ teknikaj sferoj de ŝtata aŭ interŝtata signifo estas hodiaŭ imagebla sen profunda scienca bazigo. La scienco fariĝis produktiva forto.

Estas apenaŭ imageble, ke tiom komplika problemo, kia estas la monda lingvo-problemo, povas esti kontentige solvita sen antaŭa kompleksa kaj profunda scienca

esplorado. Tio signifas, ke ŝtataj instancoj, internaciaj interŝtataj kaj neregistaraj organizaĵoj alprenos koncernajn decidojn nur setiuj estas science tute nerefuteble bazitaj.



D. Blanke parolas en la Sofia Universitato la 27an de aprilo 1979

Por la monda lingvo-problemo ĝenerale kaj por E-o tio signifas:

a) La scienco devas tute komplekse prezenti la diversajn aspektojn de la monda lingvo-problemo.

b) La scienco devas pruvi la neceson kaj la principajn eblecojn solvi la lingvan problemon.

c) Sed ne sufiĉas la monro de principaj ebloj. Laŭ nia nuna kompreno la planlingvo estas principe solvo supera kompare kun la interkonsento pri etnolingvo(j). Tion tamen la scienco devas pruvi, ĉar ne niaj espero kaj kredoj decidas.

ĉ) Kaj fine: la scienco devas pruvi, ke la preskaŭ 100 jarojn elprovita E-o estas tute natura kandidato por tiu planlingvo, kiun oni bezonas.

2. Interlingvistiko/esperantologio

Pri punktoj (a) — (c) okupiĝas formiĝanta nova scienco — la interlingvistiko. Oni tuj rimarkas, ke la interlingvistiko direktas sian intereson ne nur al la planlingvoj kaj sekve ne al Esperanto. La monda lingvo-problemo estas tre kompleksa kaj la imageblaj vojoj ĝin solvi ankaŭ, teorie, estas kelkaj.

Ni ne povas ĉi tie detaligi la diversajn konceptojn pri interlingvistiko. La jena en

la praktiko pruvigis bona laborbazo: *Interlingvistiko estas tiu nova lingvosciencia disciplino, kiu esploras ĉiujn demandojn kaj problemojn de la internacia lingva komunikado kun ĉiuj ĝiaj politikaj, ekonomiaj, lingvosciencaj kaj aliaj aspektoj.*

La interlingvistiko havas la taskon — speciale konsiderante la planlingvojn — montri la vojon al laŭeble plej efika kaj racia solvo de la problemo de internacia lingva komunikado.

La malfermiteco de la difino ne nur estas necesa por scienca agado. Ĝi ankaŭ havas la avantaĝon, ke oni trovos multe pli facile subtenantojn almenaŭ pri tiu vidpunkto, ke la monda lingvoproblemo ekzistas, 'daŭre pliakraĝas kaj sekve devas esti esplorata kaj solvata. Ne ĉiuj ĉi samvidpunktanoj pensos pri solvo helpe de planlingvo. Tio ne gravas. Ili povas fari tre utilan laboron por la ĉefaj konsideroj (a)+(b), kiujn ni supreme menciis. Venas plua ŝtupo. Ekzistas sciencistoj, kiuj ja estas principe por planlingvo, sed pro iuj kaŭzoj kontraŭ E-o. Ankaŭ ilin ni ne forpuŝos. Ankaŭ kun ili nin ligas multo pli ol nin dividas. Finfine la praktiko de E-o kaj la kvalito de la esperantologia esplorado metas E-on sur la ĝustan lokon. Ni devas substreki, ke la nekontesteblaj sukcesoj de la preskaŭ 100-jara aplikata E-o kaj la kvalito de ĝiaj konstruprincipoj metas tiun lingvon pli kaj pli en la centran intereson de la interlingvistiko (depende de la konceptoj de la unuopaj interlingvistoj).

Do oni povas diri, ke la esperantologio fariĝis certasence subbranĉo de la interlingvistiko.

Esperantologio estas tiu lingvosciencia disciplino, kiu esploras la fontojn, strukturon, evoluon kaj komunikadajn potencojn de E-o.

Sur la bazo de la normiga sistemo dokumentaro de E-o (Fundamento de E-o) kaj kongrue kun la ŝanĝiĝantaj komunikadaj bezonoj de la internacia parolantaro la esperantologio ankaŭ devas ellabori la principojn por la laŭplana konscia pluevoluigado de E-o. Esperantologio do estas deskriptiva kaj preskriptiva scienco kaj pro tio ĝi havas ligon al lingva planado. En ampleksa kaj riĉe bibliografiita artikolo „Interlinguistik und interlinguistische Forschungen“ (interlingvistiko kaj interlingvistikaj esploroj), kiu aperis en n-ro 6/1977 de „Zeitschrift für Phonetik, Sprachwissenschaft und Kommunikationsforschung“ (Berlin — GDR) mi donis superrigardon pri la interlingvistika problemaro.

3. Nuna stato

Oni povas kontente konstati, ke dum la lastaj jaroj la interlingvistikaj kaj esperantologiaj aktivecoj ne nur konsiderinde kreskis, sed ankaŭ alprenis pli kaj pli profesiajn kadrojn.



Aperas nacilingvaj (kaj ankaŭ kelkaj esperantlingvaj) verkoj. En gravaj prestiĝhavaj institutoj ekaperis interlingvistikaj aktivecoj, ekzemple en la akademioj de Soveta Unio kaj (ekde 1978) en Rumanio. Gravan sciencon agadon oni dum pli ol 10 jaroj povas noti en la universitato de Budapeŝto, kie en 1978 okazis la Internacia Interlingvistika Konferenco. En la instituto pri kibernetiko en Paderborn (FRG) kaj en aliaj okcidentaj landoj konstateblas seriozaj sciencaj esploroj.

En GDR la fakgrupo interlingvistiko/esperantologio, funkcia en Kulturligo de GDR, faris tiom da laboro (prelegoj, studoj publikigitaj, ekspertizoj, aranĝo de seminario kun lingvistoj ktp), ke ĝi estas agnoskata kiel fakte kompetenta kolektivo. Nun la tasko estas atingi ian profesiigon de la scienca aktiveco en GDR.

4. Kiel procedi?

La internacia E-movado kaj la naciaj E-movadoj devas reipensi sian strategion kaj taktikon. Tio ne signifas rezigni pri la ĝis nun taŭgaj kaj pravaj pruviĝintaj agadirektoj: nome apliki, disvastigi kaj kulturi E-on. Necesas aldoni al la agado sciencon komponenton, por ke entute povu funkcii la dialektiko inter teorio kaj praktiko.

1. La praktika movado estas la bazo por sciencaj konstatoj kaj konkludoj. Vera scienco devas deiri de faktoj. Do la praktiko efikas al la scienco.

2. La praktiko profitas el sciencaj konkludoj (pliprestiĝo de la Movado) kaj ricevas gravajn stimulojn kaj impulsojn de la scienco.

Pri tio oni, cetere, povas lerni jam ĉe Ernst Drezen, kiu vidis kaj aplikis unuecon inter teoria kaj praktika agadoj, inter politika kaj faka aktivecoj. Ĉi-rilate la soveta kaj kelkaj labristaj E-movadoj, i. a. la germana, fine de la dudekaj kaj komence de la tridekaj jaroj montris interesajn trajtojn. Mi nun proponos kelkajn paŝojn, kiuj ne nepre devas sekvi mekanike unu post la alia, sed ofte realiĝas samtempe:

a) La Landa Organizaĵo (LO) serioze kaj kontinue okupiĝu pri la loko de la scienco, pri la dialektiko inter teorio kaj praktiko en sia E-agado.

b) LO eduku la membrojn al tiu dialektika pensado, informu ilin konstante pri la sciencaj aspektoj de la IL-problemo ĝenerale kaj speciale pri E-o por anstataŭi la naivan kredon per scio.

c) LO celtrafe serĉu science interesitajn kaj kapablajn membrojn kaj interesigu ilin pri la sciencaj aspektoj de la IL-problemaro (interlingvistiko) kaj speciale pri E-o (esperantologio).

ĉ) LO fondu „Esplorgrupon pri interlingvistiko /esperantologio ĉe...“ (aŭ „fakgrupo“, „problemgrupo pri la monda lingvo-problemo/la problemoj de internacia lingvo-ktp).

d) Tiu esplorgrupo:

1. Organizu regule kolokvojn pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj temoj por interna scienca kvalifikiĝo de la membroj de la grupo.

2. Organizu kolokvojn pri interlingvistiko kaj esperantologio por neesperantistaj sciencistaj rondoj. Temoj povus esti i. a.:

— „Internacia lingva komunikado kaj ĝiaj nuntempaj aspektoj“

— „Klopodoj solvi la internacian lingvan problemon kaj la scienca prijuĝo de tiuj klopodoj“

— „Planlingvoj kaj internacia komunikado“ (spertoj speciale de E-o)

— „Fontoj, strukturo, evoluo kaj komunikadaj potencoj de E-o“

— „La valoro de la planlingvoj por la ĝenerala lingvistiko“

— „La valoro de la planlingva instruado por la lernado de naciaj lingvoj“

— „La E-movado en pasinteco kaj nun — socia mikromodelo“

— „Klerigaj kaj edukaj valoroj de E-instruado“

— „Objektoj de interlingvistiko kaj esperantologio“ ktp. (Oni unue ofertu superrigardajn, do resumajn prelegojn.)

3. Garantiu nepre la sciencon nivelon de la prelegoj kaj de la aŭskultantaro (!).

4. Entreprenu, laŭeble, proprajn esplorojn kaj publikigu ilin en nacilingvaj sciencaj revuoj aŭ libroj kaj krome verku superrigardajn sciencajn studojn por nacilingvaj revuoj, por popularigi la faktojn jam plimalpli konatajn en interlingvistikaj kaj esperantologiaj rondoj.

e) LO klopodu altiri al tiu esplorgrupo ankaŭ pli kaj pli da neesperantistaj sciencistoj por plialtigi la sciencon nivelon kaj la prestiĝon de la grupo.

f) LO klopodu ligi la esplorgrupon al iu nacia prestiĝa scienca institucio (ekz. filologia societo, universitato, akademio k. s.).

g) LO do instigu, helpe de sia esplorgrupo, profesiigon de la esploroj pri interlingvistiko/esperantologio, tamen certigante, ke estu garantiata la ĝusta atento pri la veraj faktoj kaj atingoj de E-o (por eviti rediskuton kaj pridubon de jam klaraj aferoj, ekz. ke E-o funkcias ktp.).

ĝ) LO internaciigu la agadon de la esplorgrupo (kunlaboro kun alilandaj esplorgrupoj, kun internaciaj instancoj kiel Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo (CED) k. a.)

La leganto povas vidi ankaŭ mian artikolon „La E-movado kaj sciencaj studoj“, aperintan en „der esperantist“ 2/78 (n-ro 88).

LA STREKETO KAJ ĜIA UZO EN ESPERANTO

Ĝis nun la problemo pri la uzo de la streketo en E-o ne estas studita. En multaj eŭropaj lingvoj, ekzemple en la angla, la uzo de streketo estas vere kontraŭdira kaj malfacila. Kiel montras la observado de la uzo de streketo en diversaj esperantaĵoj (gazetaro, scienca kaj belliteraturo), ĝi estas tie sufiĉe multe disvastigita. Tial aperigo de la principoj kaj sistemigo de la tipoj de ĝia uzado povus havi kelkan teoriantan kaj praktikan signifon. Konekse kun tio estas celkonforme konsideri la plej gravajn tipojn de streketuzado en la internacia lingvo E-o.

Antaŭ ĉio, streketo estas destinita por vortdivido. En gazetoj kaj revuoj oni observas nun la tendencon dividi ĉiujn silabojn kaj eĉ literojn en la vortoj, kvankam ekzistas rigora postulo pri la neceso konservi almenaŭ du literojn antaŭ kaj post streketo. Bonvolu kompari la sekvantajn ekzemplojn: kon-traŭ, li-gita, brue-gis, postulus (Paco).

Streketo povas esti uzata en kunmetitaj vortoj por konservi ilian struktur-klarecon, ekzemple: slava-cirila, psiko-fizikisto, radio-dissendo (Heroldo de E-o), radiodanĝero, tempo-maŝino (Homo kaj Kosmo).

Streketon oni vaste uzas por anstataŭigi diversajn mallongigitajn silabojn kaj tutajn vortojn, ekzemple: d-ro, s-ro, k-do (der esperantist), Neptun-festo, Nord-Ame-

riko, ĉeval-vetkuradoj, okc-eŭropaj (Heroldo de E-o), vort-atako, spion-aviadilo, mens-konfuzo, ĉi-jare, danc-arto, buĉ-viando, arbar-ombro (Paco), Esp-a poezio, konserv-fabriko (Norda Prismo), lardo- kaj bulbopecoj (der esperantist) ktp.

Oni povas doni multajn ekzemplojn, kiuj montras, ke streketo estas vaste uzata ankaŭ en kunmetitaj vortoj, kies unuaj komponantoj estas mallongigoj: E-versio, E-klubo, E-amiko, E-movado, GDR-lando (der esperantist), IOE-Gazeto (Heroldo de E-o).

Kelkloke, ne tre ofte, ni uzas streketon en geografiaj kaj aliaj nomoj, kiuj estas transportitaj al E-o de naciaj lingvoj, kie streketo estas uzata laŭ nacilingvaj tradicioj: Stoke-on-Trent (Heroldo de E-o), viet-cong (Paco).

En E-o kreskas la uzado de streketo, kiu servas por difinitaj stilaj taskoj kiel esprimrimedo, ofte por kontrasto:

Ĉu vi scias, ke sen-dota fraŭlino kaj send-ota letero estas malsamaj aferoj?

Ĉu estas lito, konsistanta el 28 lit-eroj? (der esperantist)

Do ni povas konkludi, ke la uzo de streketo en diversaj lingvoj estas interesa lingva problemo. En E-o la uzo de streketo estas relative stabila, sistemeca kaj obeas la principojn de neceso kaj klareco ĉe la vortstrukturo.

La parolo de la E-instruisto

Simeon Hesapčiev

LA BILDOJ ĈE LA INSTRUADO DE ESPERANTO

Pri la signifo de la bildoj ĉe la instruado ĝenerale kaj de la lingvoj (gepatra kaj fremda) speciale skribis multaj pedagogoj. La bildoj plivastigas la konojn pri objektoj kaj fenomenoj, helpas la koncentradon de la atento, plivigligas la penson kaj ĝi facile ricevas sian vortan esprimon. La bildoj helpas la observemon kaj la logikan pensadon. Ili estas fonto de vigla, interesa kaj senĝena interparolado. Laŭ la fama rusa pedagogo Ušinskij, la montrado de bildoj kaj la rakontado laŭ ili estas bonega rimedo por proksimigi la instruiston kaj la lernantojn.

En miaj multaj kursoj de E-o por progresintoj en Druĵevo, Burgas, Jambol, Pleven, Sofio, en GDR, ĈSSR, Pollando, Hungario

ka. mi uzis diversajn bildojn. Nun mi parolos nur pri iuj specialaj ilustritaj libroj,

Kiel redaktoro en la ŝtata pedagogia eldonejo „Narodna Prosveta“ mi vidis libron, laŭ kiu la ukrainaj infanoj lernas rusan lingvon praktike. La libro entenas bildojn de tio, kio ĉirkaŭas la infanojn, sed nenian tekston. Similan al ĝi sendis al mi la direktoro de la Slovaka Pedagogia Eldonejo en Bratislavo.

Nun mi uzas libron, kiu estas eldonita en Hungario, Slovakio kaj Jugoslavio. Laŭ ĝi la infanoj de la naciaj minoritatoj lernas praktike la oficialan lingvon de la koncerna lando, ĉar en la lernejoj ili lernas en sia gepatra lingvo. La titolo de tiu ĉi libro en serbokroata lingvo estas „Slikovnica“, en

slovaka — „O brazkova učebnica“, en hungara — „Kepes nyelvkönyv“ (ilustrita lingva libro). Ankaŭ en Bulgario estas eldonita simila libro, laŭ kiu la malgrandaj infanoj lernas praktike (sen lego) anglan, francan kaj germanan lingvojn.

La citita libro havas du partojn. La unua estas elementa, pli facila, la dua — pli alt-nivela. En la komenco de la unua parto oni vidas patron, patrinon, filon, filinon (knabon, knabinon). Sur la sekva paĝo la knabo sidas kaj skribas, la knabino kuŝas kaj legas, poste la knabo naĝas, la kvabino kuras. Sur kelkaj el la unuaj paĝoj estas similaj simplaj bildoj kaj malsupre oni bezonas ripeteti la samajn frazojn, kunigante ilin mekanike. Poste venas malgrandaj rakontoj pri tio, kio ĉirkaŭas la infanojn, pri la bestoj, pri la hejmo, pri la lernejo ks. Sur paĝoj 16 kaj 17 ni vidas ses momentojn: 1. La knabineto vekiĝas, la kato ankaŭ ellitiĝas; 2. La patrino vestas sian filineton, pa kato lavas sin; 3. La patrino kaj la knabineto matenmanĝas, la kato ankaŭ; 4. La patrino kuiras, la knabineto kuiras (ludante).

Krâsti na Aleksova

LA DOMETO DE LA MUSO

Fabelo laŭ bildoj

La muso sidis en sia dometo, ĵus konstruita. La rano frapis sur la pordo: frap, frap, frap! Kaj frapante ŝi ekparolis:

— Najbarino, bonvolu malfermi la pordon! Mi volas gasti ĉe vi.

— Kiu estas? — demandis la muso, montrante kapeton tra la pordo. — Ho, mia kara najbarino! — diris ĝoje ŝi kaj invitis la ranon eniri.

— Mi enuis kaj decidis viziti vin por vidi vian novan dometon.

— Ho, mi ne enuas. La hejmaj laboroj min okupas grave. Ĵus mi ree pripensadis la ordigon de la mebloj. Sed bonvolu eniri, bonvolu! — la muso ripetis la inviton gastame.

La du amikinoj eniris la ĉambron. Sed apenaŭ ili eksidis kaj ne sukcesis vorton elparoli, aŭdiĝis nova frapado: frap, frap, frap!

— Kiu estas? — demandis la muso.

— Mi, la leporo, — respondis milda voĉeto. — Mi volas gasti al vi kaj gratuli vin pro la nova dometo.

— Volonte mi akceptos vian gratulon! Bonvolu, eniru, kara amiko!

5. La patrino akvumas la florojn, la knabineto kuras post la kato, kiu persekutas muson; 6. Tra la fenestro oni vidas la lunon, la patrino enlitigas sian filineton kaj la kato dormas en sia liteto.

Sur paĝoj 26 kaj 27 oni vidas la konatan fabelon pri la Ruĝa Ĉapeleto, prezentitan en ok momentoj. Estas ankaŭ la fabeloj pri la korvo, la fromaĝo kaj la vulpo, pri la fiŝisto kaj la ora fiŝeto, pri la lupo kaj la sep kapridoj (prezentita en ses momentoj).

La ilustraĵoj estas simplaj kaj klaraj. Mankas detaloj, kiuj povas fortiri la atenton. Ekzemple la arbaro estas prezentita per verda makulo kaj 3—4 arboj.

Ĉirkaŭ la fino de nia kurso por progresintoj (marto—junio 1979) oni dum du lernohoroj rakontadis fabelon pri la dometo de la muso kaj kolektiĝintaj tie gastoj — rano, leporo, vulpo, lupo, urso. Post tiu ĉi rakontado en la kurso ĉiuj hejme faris verkojn.


Por la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ ni prezentas unu el la verkoj (de kursanino Kr. Aleksova) kaj du el la bildoj de la libro

Dankon, ke vi rememoris pri mi! Dankon, mia inteligenta amiko! Ni kolektiĝos tri geamikoj kaj bone amuzos nin. Eniru!

La muso, la rano kaj la leporo parolis iomete kaj komencis kanti, ĉar la rano, fama kantistino, rapidis montri sian talenton. La leporo nur ripetadis la refrenon.

La kanto aŭdiĝis profunde en la arbaro. Aŭdis ĝin la vulpo kaj rapide alvenis. Frap, frap, frap! — ekfrapis ŝi sur la pordo.

— Ankaŭ mi volas partopreni la agrablan kunestadon. Mi dancas bonege. Ho, vi ĝue vidos mian novan



dancualeton, — ŝi vulpe ekparolis.

— Estu bone veninta, karega, ni formos kvarteton, — la muso invitis ankaŭ ŝin en la dometon. — Enirinte la vulpo diris al la rano:

— Mi tre ŝatas la muzikon, mia bona amikino. Vi estas konata kantistino. Sed vi regas ankaŭ violonon, ĉu ne?

— Ne, — respondis la rano, — la grilo posedas violonon.

— Ho, mi eraris, vere, vere. Sed per kiu kanto ni komencu? Per kiu? . . . Al mi plaĉas. . .

Tamen la kvarteto ne ekkantis, ĉar la lupo, preterpasante, divenis pri la amuzo kaj ekvolis partopreni ĝin. Frap, frap, frap! La lupo provis mildigi sian voĉon kaj ekparolis:

— Muso-o-o, kara najbarino, ankaŭ mi volas partopreni la amuzon.

— Bonvolu, kara lupo, bonvolu! — la muso renkontis afable la lupon. Kolektiĝis kvinteto.

La kvinteto ekkantis. Fariĝis tia bruoj, ke la dometo ekstremitis. La vulpo sin montris vere bona dancistino, ŝia lerta, furioza danco ravis ĉiujn.

Ankaŭ la urso, preterpasante la dometon de la muso, aŭdis la gajan bruon. Frap, frap, frap! Malpacience li ekparolis:

— Karega muso, ankaŭ mi volas partopreni tiun ĉi gajan amuzon.

La urso tiel rapidegis aliĝi al la gaja kompanio, ke li eĉ ne atendis la muson malfermi la pordon. La urso ekpuŝis ĝin per sia mallerta, granda korpo, kaj la dometo tuj falis. Forflugis diversflanken pordo, fenestroj kaj tabuloj de la muroj kaj de la tegmento.

La urso sentis sin tre kulpa, tial levis la manojn preĝe kaj petis la muson:

— Pardonon mi petas, kara muso! Kiel mi povis? Ho, tiu ĉi grandega mia forto, malbenita estu ĝi!

La amuziĝantoj jam ploris pri la bela dometo. Sed la leporo unua ĉesis plori kaj diris:

— Ne helpas ploro, necesas laboro! La rano laŭtvoĉe aldonis:

— Kiel ni amuziĝis kolektive, tiel ni rekonstruos la dometon de nia amikino kolektive.

La ceteraj gastoj tuj akceptis la proponon. Komenciĝis vigla laboro. Baldaŭ la dometo estis denove preta, pli bela kaj pli solida ol antaŭe. Kaj denove ektondris kantoj en la musa dometo.

Verdaj steletoj

Ivan Haĝimarĉev

DANĜERA TASKO

Kalitko ricevis de sia komandanto bataltaskon. Li ekiris kun Gapi. Ili marŝis laŭ kaprovojoj, malsupreniĝis en valojn kaj valetojn. Fine la du knaboj alvenis. Antaŭ ili ekbriletis la forst-administrejo sub la pala lumo de la luno. En la ĉambro

de la arbargardistoj estis lume. Kalitko demetis siajn mokasenojn, poste eligis el sia poŝo sange makulitan bandaĝon kaj ĉirkaŭvolvis la kalkanon de sia nuda piedo. Farinte tion li prenis sian bastoneton kaj ekiris al la domo de la forst-administrejo.

Unue — ekrigardi tra la nealta fenestro. En la ĉambro lumis petrola lampo. Sur larĝa tabula lito dormis kvar arbargardistoj. Nur la kvina sidis kun kubutoj surtable kaj ankoraŭ ne dormis. Ĉe unu el la muroj staris iliaj pafiloj. Kiam Kalitko ekvi-



dis ilin, io ekstrems en lia brusto: „Kiel tiuj pafiloj estas necesaj nun por la taĉmento!“

Kalitko duonfleksiĝis, sin apogis je la bastoneto kaj ekĝemis. La dormetanta arbargardisto ekstrems sur la seĝo, eksaltis sur piedojn kaj ekiris al la fenestro. Lia vizaĝo havis timigan aspekton. Kalitko montriĝis pli bone, por ke oni vidu, ke li estas senkulpa infano.

— Kies ci estas? De kie ci venas en tia tempo? — diris la arbargardisto.

— Ho!... Mi venas el Velevo. Survoje mi tranĉvundis la kalkanon sur vitropeco, tial mi malfruis kaj nun mi ne povas marŝi, dio mia!...

— Ne kriegu! — per fingro surbuŝe avertis la arbargardisto kaj invitis la knabon eniri la ĉambron. — Mi mortas pro maldormo, — deklaris li, larĝe oscedante. — Restu por gardi. Mi iomete dormos.

Li rulkuŝiĝis sur la tabulliton apud siaj kamaradoj kaj tuj ekronkis. Sed Kalitko ne rapidis. Li plue mallaŭte ĝemis kaj duonokule ĉirkaŭrigardis jen la ĉambron, jen la dormantajn virojn. Pasis preskaŭ tuta horo. Apenaŭ tiam Kalitko leviĝis atente, proksimiĝis al la pordo, malŝlosis ĝin kaj revenis surfingre al sia loko.

Unue li malplenigis negrandan keston da kartoĉoj kaj enpoŝigis ilin. Poste komencis elporti eksteren la karabenojn du post du. Fine li senbrue fermis la pordon malantaŭ si. Neniu eksentis lin.

— Nu, plenvapore, Gapi! — ekkrietis li al sia kamarado.

La du knaboj surŝultrigis la pafilojn kaj ekkuris tra la arbaro. Jam mateniĝis, kiam ili atingis la partizanan bivakon.

Rekomence la komandanto de la taĉmento donacis karabenon al Kalitko. Kalitko fariĝis vera partizano.

El la bulgara: Kovo

EL ALVOKO

„MONDA ŜAKSIMULTANOJ POR INFANOJ“

Esperanta Ŝak-Ligo Internacia (ESLI) anoncas mondan ŝaksimultanon okaze de la Internacia Jaro de la Infano. Ĉi-jare inter la datoj 18—25 de novembro la simultanoj okazos en la tuta mondo.

Ĉiuj organizoj kaj emuloj estas petataj — samtempe dum la menciita semajno — aranĝi ŝaksimultanon por infanoj.

La kuna, videbla movado povas montri vere la valoron de la moto de FIDE (Internacia Ŝak-Ligo): „Gens una sumus“ — Unu gento ni estas!

1) Ni petas la organizojn (ŝakligoj de la landoj, junularaj organizoj, lernejoj, sportkluboj, landaj E-asocioj, E-grupoj, redakcioj de gazetoj, revuoj, radio-dissendoj, televizioj) kaj la ŝak-simultandonantojn (grandmajstroj, majstroj, ŝakludistoj) aliĝi al la movado, propagandi, helpi, aranĝi, doni la ŝaksimultanon enkadre de la granda monda ŝaksimultano — laŭ ebleco senpage.

2) Por la helpantoj, por la ŝak-simultandonantoj, por la sukcesaj infanoj (ludintaj) ESLI donacos po unu memordiplomo kaj presota albumo en E-o.

Ĉiujn intencojn, proponojn, aliĝojn, interesajn revuojn, gazetojn, propagandilojn, fotografaĵojn pri la infanŝako — kaj ĉefe la rezultojn de la ŝaksimultanoj adresu al D-ro Jozefo Nemeth, prezidanto de ESLI: Kalocsa, Szabo J. u. 3 sz., 6300 Hungario,

PENSOJ DE EMINENTAJ BULGAROJ NASKITAJ EN SEPTEMBRO

La allogo al antirealismaj tendencoj en la arto kaŝas multajn danĝerojn. Malantaŭ ili plej facile povas kaŝi sin sentalenteco. En ili, same tiel facile, povas pereii talento.

Dimitro Talev, verkisto (14. IX. 1898 — 20. X. 1966)

La leĝo estas provizora, la justeco — eterna.

Per toleremo sin konsolas la besto, sed ne la homo.

Petko J. Todorov, verkisto (26. XI. 1879 — 14. II. 1916)

Elektis kaj tradukis Stojan Kostadinov

ATENTU!

GRAVEGA!

URĜA!

Responde al nis peto la Komitato de Gazetaro ĉe la Ministra Soveto de PR Bulgario aprobis novan formaton de la asocia organo „Bulgara Esperantisto“ (egala al la formato de gazeto „Paco“). Dank' al tio la amplekso de „BE“ kreskas preskaŭ duoble. Notinda kaj ĝojiga sukceso! Do ekde januaro 1980 ĉiu numero de „BE“ donos al la leganto multe pli kaj variajn materialojn kun serioze plibonigita teknika kaj arta aranĝo.

*Ĉe tiu preskaŭ duobla grandigo de la amplekso la abonprezo kreskas tute modeste: por Bulgario — 2.90 levoj, por socialismaj landoj — 5.42, por ĉiaj ceteraj — 5.90. Do la bulgaraj esperantistoj ricevos **240 grandformatajn paĝojn nur por 2.90 levoj!** La eksterlandaj esperantistoj povas aboni „BE“ kontraŭ egalvaloro. Por Sovetunio la abonprezo estas 5 rubloj.*

Societaj, sekciaj kaj distriktaj estraroj de BEA! Aktivuloj! Samideanoj! „BE“ estas via utila konsilanto kaj fidela amiko, aktiva informanto, bona lingva instruisto, sincera edukanto en via ĉiutaga laboro. Mobilizu ĉiujn fortojn, utiligu ĉiun eblecon por maksimuma nombro de abonantoj! Neniu bulgara esperantisto sen „BE“! Abonigu ankaŭ ĉiun popolan legejon kaj kulturdomon, ĉiun sindikatan kaj komsomolan bibliotekon, kie estas esperantistoj! „BE“ estas bonega, valora donaco ankaŭ por via eksterlanda amiko — abonigu lin!

Al energia kaj obstina laboro por maksimuma nombro de abonantoj de „BE“! Ne atendu la lastan tagon de la abonkampanio — la 31an de novembro! Agu tuj! Seprokraste! Entuzisme! Fidele!

6100 abonantoj — plej inda atingo honore al la 40a jubilea kongreso de la bulgaraj esperantistoj!

ВАЖНО!

ВАЖНО!

ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ ПО ЕСПЕРАНТО

Софийското окръжно-градско ръководство на Българския есперантски съюз ежегодно урежда **ЗАДОЧНИ КУРСОВЕ ПО МЕЖДУНАРОДНИЯ ЕЗИК ЕСПЕРАНТО**. За новата 1979—80 учебна година курсовете се откриват от 1 октомври т. г.

Многогодишната практика по безспорен начин потвърди ефикасността на задочното обучение, което е много подходяща форма за усвояване на есперанто особено за онези граждани, които поради естеството на своята работа не могат да посещават присъствени занятия в определено време.

Застъпени са следните степени на обучение: I — за начинаещи, II — за напреднали и III — за усъвършенствуване по езика.

ТАКСАТА за всеки степен е 15 лв., включваща и стойността на изпращаните учебни помагала.

В курсовете може да се запише всеки гражданин, младеж, учащ се. За курсови ръководители са привлечени висококвалифицирани дипломирани преподаватели по есперанто.

През учебната година за всяка степен се предвиждат и поне по две присъствени занятия от по 4—5 учебни часа.

За справки и записвания: Окръжно-градско ръководство [на Български есперантски съюз, бул. „Хр. Ботев“ 97, 1303 София, тел. 31-61-80. Суми се провеждат на адрес: София, ДСК Благоевски район, сметка 185/2553 на Окръжно-градското есперантско ръководство.

